

## **Nitobe-Simpozio:**

### **“Esperanto kaj interlingvistiko kaj ilia rilato al la disciplinoj”**

**Lisbono, Portugalio, 4-5 aŭgusto 2018**

#### ENKONDUKO

Instruado kaj esplorado pri Esperanto kaj interlingvistiko disfloras en universitatoj tra la mondo, sed estas granda bezono pri kunordigado kaj integriĝo de interlingvistiko en la ĉefajn universitatajn kursojn. Tio estis ĝenerala konkludo de la lasta Nitobe-Simpozio, kiun ESF okazigis en Lisbono, Portugalio, la 4-5-an de aŭgusto. La simpozio, kiu kunvenigis 50 invititajn profesorojn kaj esploristojn de 20 landoj tra la mondo, donis specialan atenton al kursoj kaj programoj en universitatoj en Pollando, Germanio, Usono, Hispanio, Kostariko kaj Barato, kaj pritraktis demandojn kiel ekzemple la bezonon de pli multaj kaj pli ampleksaj lernolibroj, la gravecon de kontinueco ene de ekzistantaj programoj, kaj vojojn al ekspansio de proponado de kursoj al pliaj universitatoj.

La studkampo interlingvistiko okupiĝas pri planlingvoj, kiel ekzemple Esperanto, kaj pri la rilato inter planlingvoj kaj lingvoplanado.

Iom post iom, bakalaŭraj kursoj pri planlingvoj disvastiĝas, inkluzivante ne nur historion de lingvoj planitaj por internacia uzo, sed ankaŭ la kampojn de elpensitaj, fikciaj lingvoj. Dum la simpozio, oni ripete emfazis, ke la fenomeno de planlingvoj helpas pli bone kompreni ĝeneralan lingvistikon kaj la planadon de lingvouzado je internacia nivelo.

Krome, oni konstatis la multflankajn eblecojn por sinergioj, kiuj ekzistas en rilataj fakoj ene de la sociaj sciencoj, kaj pri kiuj oni povas profiti ambaŭdirekte. Tio estas, potencigante interlingvistikajn elementojn ene de kursoj kaj esploroj pri sociologio, historio, politika scienco, antropologio ktp, sed ankaŭ adaptante teoriajn kadrojn kaj metodikojn de la sociaj sciencoj por antaŭenigi la esploron kaj la instruadon de interlingvistiko kaj esperantologio.

ESF okazigas Nitobe-Simpoziojn ĉiujn kelkajn jarojn. La antaŭa simpozio okazis en Rejkjaviko en 2013, kaj la venonta estas planita por Montrealo en 2020. La simpozioj estas nomitaj honore al japana diplomato Nitobe Inazo, Asista Ĝenerala Sekretario de Ligo de Nacioj en la 1920-aj jaroj kaj subtenanto de Esperanto.

## RESUMO DE LA DISKUTOJ

La simpozio okazis la 4-an kaj 5-an de aŭgusto, 2018, en Lisbono, Portugalio, tuj post la 103-a Universala Kongreso de Esperanto en tiu urbo. Prezidis Humphrey Tonkin. Organizis Javier Alcalde. Protokolis Javier Alcalde kaj Ĵenja Amis.

## UNUA TAGO

### *Enkonduko*

Tonkin prezentis la celojn de tiu ĉi Nitobe-simpozio:

1. Pridiskuti kaj plani la estontecon de Esperanto kaj interlingvistiko (Ekl) en instruado kaj esplorado
2. Konsideri la rilaton inter la diversaj disciplinoj unuflanke kaj Ekl aliflanke. Ekzistas fendo inter kernaj disciplinoj kaj niaj agadoj. Oni devas pensi kiel transponti la fendon. Kiel igi Ekl integra parto de instruado pri ĝenerala lingvistiko, instruado pri lingvopolitiko ktp kaj kiel enkadrigi tiujn disciplinojn en instruado pri Ekl? Kiel tion fari por aliaj disciplinoj?

### **Sabine Fiedler (Universitato de Leipzig)**

#### ***Esperanto kiel esplorobjekto en soci/interlingvistiko***

Gravas instigi socilingvistikajn esplorojn pri la Esperanto-komunumo. Nuntempe tiuj socilingvistikaj esploroj, se ili estas farataj entute, estas farataj “amatore”. Rezulte, persistas stereotipoj pri Esperanto ĉe socilingvistoj. Fiedler proponis la jenajn konsilojn kaj sugestojn:

#### **1. Taskoj (ideoj por esploroj ktp.)**

- a. Esperanto kiel uzata lingvo (la sinkrona ebena). Homoj kiuj faras esplorojn ofte ne scias ke oni povas ekz. organizi eventon k. s. en Esperanto. Lingvostrukturoj, idiomaĵoj ktp.
- b. La varieco de Esperanto (la diakrona ebena: lingvoŝanĝiĝado)
  - genrovariantoj, ekz., ekde sciencaj prelegoj [terminoplenaj] ĝis poezio;
  - tavoloj de signifo;
  - parola Esperanto kontraŭ skriba Esperanto
  - junulara lingvaĵo
- c. Esperanto kiel lingvo / fako inter aliaj: morfologio, genroj, salutmanieroj – normalaj lingvoesploroj kiuj helpas vidi Esperanton kiel normalan studobjekton – necesas kiom eble plej “normaligi” la studojn pri Esperanto kiel kutima lingvo.

#### **2. Nepraĵoj**

- Inkluzivi Esperanton en konferencojn pri rilataj temoj: lingva justeco ktp. : Esperanto estas fakto kaj realaĵo kiu devas esti studata.
- Kontribui al aliaj fakoj – minoritataj lingvoj, “kontestataj lingvoj”.
- Studado de interlingvistiko restu en la fako de planlingvoj.
- Partopreni en la debatoj pri temoj kiuj povas tuŝi Esperanton.

- Disvastigi *Tekstaron* kaj korpusojn ĝenerale.
- Spuri lingvoŝanĝiĝojn: la historia flanko.

### **Ilona Koutny (Universitato Adam Mickiewicz, Poznan, Pollando)**

#### ***Debato pri la nuna stato de studoj kaj esploroj en Ekl***

Koutny demandis ĉu esperantologio estas subfako de interlingvistiko aŭ aparta tereno. Esperantologio konsistas el studado de la filologio de Esperanto en ĉiuj ties formoj (ne nur lingvistiko – ankaŭ kulturo, do pli larĝa fenomeno). En tiu senco eblas diri ke E estas natura lingvo kun planita origino. Koutny donas jenajn konsilojn kaj sugestojn:

1. Necesas meti interlingvistikon sur la terenon de aplikata lingvistiko

2. En tiu rilato studentaj estas:

- Esperanto en interkultura komunikado
- Denaskismo (la fenomeno de “denaskaj esperantistoj”)
- Leksikografio kaj terminografio
- Lingvopolitiko
- Esperanto kiel socia movado
- Esperanto-literaturo, tradukado
- Pragmatiko de Esperanto
- Filologio – kio estas pli vasta ol simple studo pri lingvoj.

Koutny levis demandon pri la lingvo de esperantologio. Ĉu ni bezonas publikaĵojn unuavice en Esperanto, en naciaj lingvoj por ekstera publiko, en la angla kiel la plej disvastigita (sed samtempe diskriminacia) lingvo? Necesas “nutri” alilingvajn publikaĵojn per verkoj pri Ekl.

#### **Aliaj intervenoj:**

**Tonkin:** Diskriminacio veras; sed oni ne havas alternativon (estu almenaŭ helpo de anglalingvanoj); necesas submetiĝi al la reĝimo por ŝanĝi la reĝimon. Lukti kontraŭ ĝi nur garantias nian marĝenigon: necesas enpenetri la anglalingvan mondon de plej prestiĝaj revuoj kaj konsciigi la fakulojn kvazaŭ deinterne.

**Stria:** Oni provu fari duoble: publikigi en la angla kun resumoj en la pola ktp.

**Leoni:** En kiom da tempo artikoloj estas publikigitaj en internaciaj revuoj? Ofte tro longas la periodo.

Sekvis ĝenerala diskuto pri la nunaj bezonoj se temas pri studoj kaj eldonaĵoj. Ni bezonas bazajn verkojn pri lingvistiko, literaturo, movado, kulturo ktp. de Esperanto.

Iuj partoprenantoj emfazis la bezonon de bona materialo pri la lingvistiko de Esperanto kaj pri interlingvistiko ĝenerale. Ĉu la nova lernolibro de Barandovská, farita por la programo ĉe UAM, taŭgus, eventuale tradukita ankaŭ en aliajn lingvojn? Ĉu necesus ankaŭ aldoni materialon pri imagitaj, fantaziaj lingvoj de la speco emfazita de iuj fakuloj celantaj kapti la interesojn de studentoj?

Oni ankaŭ memorigis pri libroj pri Esperanto kiel fenomeno: Janton, Auld, Schor; kaj pri literaturaj studoj la (anglalingva) enciklopedio de Sutton kaj la (esperantlingva) historio de Minnaja kaj Silber.

Aparte necesas doni pli da atento al la Esperanto-komunumo, el psikologia, historia, sociologia vidpunktoj.

### **Juan Diego Bautista (Universitato de Sevil, Hispanio)**

#### ***Raporto pri instruado de Esperanto en universitatoj***

La raporto, pretigita por la Nitobe-seminario, estis farita laŭ larĝa vidpunkto. Detalojn oni trovas ĉe *kunagade.org*. Necesas daŭrigi la laboron, kolektante informojn pri kursoj kaj universitata agado, inkluzive de informoj kiuj ne aperas en *Edukado.net*. Sur la mapo aperas ne nur kursoj pri Esperanto, sed ankaŭ kie Esperanto aperas ankaŭ ene de aliaj kursoj (psikologio ktp.). La raporto ne kovras materialon en fakaj revuoj, nek informas pri interŝanĝo de spertoj por varbi en universitatoj.

**Kováts.** Kiel difini kursojn? Kiu estas la minimumo longeco? Semestro? Semajnfino? Kiel igi homojn ĝisdatigi informojn pri kursoj? Kiel eblas krei komunan datumbazon?

### **Maria Majerczak (Jagelona Universitato, Krakovo, Pollando)**

#### ***Debato pri Esperanto kaj universitato***

Majerczak traktis la demandon sub kvin subpunktoj:

1. *Kontaktoj* : Kontaktoj inter instruantoj de Esperanto kaj potencialaj instruantoj kiuj ne sentas sin sufiĉe preparitaj. Kiel fari? Kiel helpi kaj kuraĝigi izolitajn profesorojn instrui Esperanto-rilatajn kursojn?

**Baláž.** Ĉu UEA iniciatu tian projekton (kompilante liston de kursoj ktp.)? Necesas havi modelojn por eksteraj rilatoj.

**Kováts.** Ĉe *Edukado.net* jam troviĝas multege da materialoj kiuj permesas elŝuti kaj modifi la programon por difinita universitato aŭ kurso. Eblas aldoni modellecionojn. Gravas ne komenci de nulo sed utiligi tion kion oni havas.

2. *Instruiloj* : kion ni havas? Kion ni bezonas?

**Kováts.** Ni dediĉu pli da atento al tradukado de lerniloj.

**Tonkin.** Eviti bonajn konferencojn kun nulaj rezultoj (la Amsterdama konferenco de 2008, kvankam engaĝita en si mem, kun multaj bonaj ideoj, produktis tre magran rezulton).

**Koutny.** Nepre ĉerpi materialojn el ekzistantaj kursoj. Certigi ke la homoj kiuj gvidas kursojn jam havas konstantan postenon, tiel certigante la eblecon de kontinueco.

**Tonkin.** Ĉu oni povus produkti libron kiu estus facile tradukebla por ke aliaj povu utiligi ĝin, eble kun modifoj?

3. *Kohero* : Kiel malgrandigi la fendon inter lingvistiko kaj socisciencoj unuflanke kaj interlingvistiko aliflanke?

**Dubourg-Glatigny.** Kiom da lingvistoj pretas kunlabori kun ni? Kio pri interdisciplinaj projektoj? Ĉu eblas altiri specialistojn pri diversaj fakoj – lingvistiko? Sociaj sciencoj? Ĉu

iaspeca forumo povas esti okazo por pripensi kaj liveri siajn labordisponeblecon en tiaj projektoj?

**Alcalde.** Konkreta projekto: La Dua Mondmilito en larĝa senco. Oni povus esplori la Duan Mondmiliton per rakontoj kaj historiaj fontoj Esperantaj. Diversfakaj homoj povus kontribui. Ĉu Esperanto ebligis transnacion aliron al la milito?

**Tonkin.** Kiel certigi ke niaj informoj estas diskonigitaj ankaŭ ekster Esperantujo? Ni estas fermitaj en nia rondo, same kiel lingvistoj estas fermitaj en sia medio.

**Goodall.** Ĉiuj specialistoj luktas kun la sama problemo.

**Viau.** Ĉu specialistoj pri piĝinoj/kreoloj interesiĝus pri Esperanto?

**Kováts.** Lanĉi konkurson por iu realigebla programo? Ekzemple pri ellaboro de universitata kurso.

**Raola.** La Esperantologia Konferenco povus okupiĝi pri ĝuste tiu temo (ellaboro de kurso) venontjare.

#### 4. *Esplorado.* Kiel allogi esploristojn al esplorprojektoj?

Oni atentigis, ke Esperanto kaj rilataj demandoj estas riĉa kampo por sociologiaj kaj aliaj temoj. Oni aldonis, ke necesas difini interesajn temojn kaj poste subteni ilin per financaj rimedoj por esplorado (ekzemple pere de ESF). Krome, oni emfazis la gravecon de kunlaboro kun ILEI.

#### 5. *Celoj.* Kiujn celojn havu Esperanto-agado en universitatoj?

**Leoni.** Ligi kun minoritataj lingvoj. Eblas fari normalan projekton rilatan al minoritataj lingvoj kiu tuŝas Esperanton, en universitata medio.

**Koutny.** Formi homojn kun pozitiva aliro pri Esperanto en nia tereno.

**O'Riain.** Substreki ke Esperanto estas uzata lingvo kaj havas komunumon.

**Keefe.** Krei datumbazojn ktp. kiuj liveru fontojn pri la efektiva situacio de Esperanto – ne sufiĉas la nune alireblaj fontoj por komenci esploron.

### **Duncan Charters (Kolegio Principia, Usono)**

#### ***Prezento de ILEI-agado***

Charters priskribis potencialan rolon de ILEI en esplorado kaj en la universitata instruado de Ekl. Li montris al kontaktoj inter ILEI kaj Monica Heller, prezidanto de la Amerika Asocio de Antropologoj, kiu favore verkis pri Esperanto. Li aludis al kunlaboro inter ILEI kaj la Akademio Internacia de la Sciencoj, pri eventuala rolo en la Amsterdama katedro, kaj ĉefe pri la laboro farita en la ĵusa ILEI-kongreso en Madrido.

Li sugestis, ke ILEI povu ludi gvidan rolon rilate al

- Kreo de baza lernolibro pri interlingvistiko tradukebla en aliajn lingvojn
- Paneloj/diskutoj/kolokvoj por ligi Esperantistojn kaj ne-Esperantistojn, ekzemple en fakaj konferencoj.
- Platformo por peri kontaktojn (disvastigo de materialoj / prezentoj por helpi al instruado de interlingvistiko kaj esperantologio).

## DUA TAGO

### Mireille Grosjean (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)

#### *Diskuto pri ILEI-agado*

Grosjean reprenis la hieraŭan debaton, nome "Prioritatoj kaj iniciatoj" de ILEI. Ŝi menciis plurajn programojn por lertigi instruistojn, ĉefe en Francio, kunlabore kun *edukado.net*, kaj retajn kaj ĉeestajn.

**Majerczak.** Refari la Paderbornan eksperimenton por pruvi la lernefikon de Esperanto, ideale kun partopreno de usona aŭ kanada (ĉefe kebekia) universitato, eble ankaŭ Monica Heller.

**Grosjean.** Proponi kunlaboradon inter (iu kantono de) Svislando kaj Francio.

**Koutny.** Preni inspiron de eksperimento farita en Budapeŝto, sed nun malfacile realigebla, ĉar en multaj landoj oni jam instruas la anglan ekde tre frue.

**Tonkin.** Decidi kion ni celas per tia eksperimento. Ne nur studi en Eŭropo, sed ankaŭ Azio, Afriko ktp. Pri *Springboard to Languages*, vidu artikolon en *LPLP*, kiu konkludas ke Esperanto ne estas pli avantaĝe lernebla ol aliaj lingvoj (Karen Rohr-Brackin k Angela Tellier, "Esperanto as a tool in classroom foreign language learning in England," *LPLP* 42 (2018), 1: 89-111). Rigardi ankaŭ Fantini kaj Reagan (trovebla ĉe *esf.org*).

**Koutny.** Plivalorigi la interlingvistikajn studojn en Poznano. Ekz. ĉ. 1/3 de la partoprenantoj en tiu ĉi simpozio rilatas iumaniere al tiuj studoj.

**O'Keefe.** Uzi nian intelektan forton por kontroli kio jam nun okazas. Ni ne simple ripetu iun eksperimenton, sed ni pensu pli malferme pri tiu tereno.

**Kováts.** Oficialigo fare de la naciaj aŭtoritatoj permesas eventuale fari aferojn grandskale.

**Grosjean.** ILEI volas sekvi tiajn diskutojn kaj pretas kunlabori, ekz pere de niaj du revuoj. ILEI estas asocio de instruistoj ĉiunivele (inkluzive de universitatnivele), de Esperanto kaj de Esperantistoj.

### Roberto Garvía (Universitato Carlos III, Madrido, Hispanio)

#### *La Esperanto-movado kaj socisciencaj esploroj*

La prezento de Garvía koncentriĝis je sociologio, sociaj movadoj, kaj historio, kun ekzemploj el Hispanio kaj Katalunio. En la pasinta jardeko okazis multa esplorado pri Esperanto, inkluzive de libroj de Okrent (ne faka verko, sed furoraĵo kiu donis grandan videblon al Esperanto), la biografio de Zamenhof de Korĵenkov's, la verko de Adams *From Elvish to Klingon* (Oxford University Press), la biografio de Zamenhof de Künzli, *Die Neutrale Sprache* de Sikosek, Lins, Gordin, Schor (kiu ankaŭ altigis la videblon de Esperanto), Garvía.

En multaj teoriaj debatoj Esperanto povus helpi la antaŭenigon de sociscienca esplorado. Inter ili estas:

- **Laborista historio.** Ekzemple SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) kiel esplortemo: internacia nehierarkia laborista asocio, ties defioj, ties decidoj, kiuj (endogenaj kaj eksogenaj) variabloj povas klarigi ĝian historion.
- **Socia historio / sociaj movadoj.** Tradiciaj esploroj (en kompara sociologio kaj historia sociologio) favoras simpligon, ĉar tio ebligas testojn pri falsigo. Ni studas agantojn ene de fermitaj limoj, bone difinitaj identecoj, celoj, intrerna homogeneco, ktp. Sed la reala vivo estas pli komplika, malorda, malpreciza, malferma, neantaŭvidebla, sen klaraj koloroj, fermitaj limoj kaj stabilaj identoj.

Studante katalunajn esperantistojn komence de la 20-a jarcento, ni vidas, ke la homoj moviĝis trans movadoj, eksperimentis pri siaj vivoj, laboris kune, kaj kreis "nenaturajn" aliancojn.<sup>1</sup>

La norma historio de Hispanio implicas, ke la reĝimo de Franco estis dezerto por volontulaj organizaĵoj. Mankis civila socio: organizaĵoj estis nur parto de la disvastiga mekanismo de la reĝimo kaj la Eklezio; mankis loko por interkomunikado. Sed tiu aliro malatentas la restarigon de la Hispana Esperanto-Federacio en 1947: ĝiaj gvidaj membroj venis el ambaŭ flankoj de la tranĉeoj. Kiel? La Esperanto-movado estas internacia, ekzistanta en ĉiu angulo de la mondo. Temas pri utila kompara socia esplorado, de la speco farata de Lins. Ni komparu ĝin en diversaj reĝimoj, ekzemple Hispanio kaj komunista Germanio, por pesi kiel aŭtoritatismaj reĝimoj funkcias. Tia esplorado altigos la videblon de Esperanto.

**Goodall.** Ĉu tiu transismo okazis nur inter esperantistoj?

**Garvía.** Ekzistas pli granda motivo por kunlaboro inter esperantistoj – por ekzerci la lingvon, krei komunumon, ktp.

**Goodall.** Kiam oni lernas lingvon, la sindediĉo kaj ligiteco pligravas ol, ekzemple, ĉe nudismo.

**Keefe.** Jam de la 1980aj jaroj, membreco en UEA malaltiĝis, kiel en multaj aliaj asocioj kaj movadoj.

**Charters.** Kiam aperis *Kataluna Antologio*, kiom unika ĝi estis? Ĉu ekzistis aliaj similaj klopodoj aperigi katalunan literaturon en aliaj lingvoj?

**Tonkin.** Vidu la artikolon de Lloancy pri la Esperanto-kongreso en Barcelono en 1909, periodo de ekstrema streĉiteco. Zamenhof, embarasite de la politika situacio, eldiris sian plej mallongan kongresan paroladon. Kiumaniere en 1953-1990 la orienteŭropaj esperantistoj akomodigis al ties reĝimoj? Ekzistas bona disertacio pri la Esperanto-movado en Bulgario de Anna Velitchkova (University of Notre Dame). Nunaj studentoj verku pri tiuj temoj.

## Michele Gazzola (Universitato de Leipzig)

### Ekl kaj sociaj sciencoj

Enkondukante la debaton, Michele Gazzola donis ekzemplojn el:

- Ekonomiko: makroekonomiko (Grin), mikroekonomiko (Pool, Selten)
- Politikaj sciencoj: diplomatio, internaciaj rilatoj, politika filozofio (lingva justeco), analizo de publikaj politikoj, scienco de administrado, politika sistemo, balotsistemoj
- Sociologio de la lingvo kaj sociolingvistiko
- Studo de institucioj kiel familio, religio, kulturo
- Psikologio: psikolingvistiko (Corsetti, Tellier, Frank), socia psikologio (Piron)

Sekve li proponis aron da esplordemandoj:

1. Efikoj de lingva diverseco/Esperanto/lingva hegemonio sur

- Politikaj variabloj: povo/rolo de la ŝtato
- Ekonomiaj variabloj: mono/decidoj

---

<sup>1</sup> Elstaraj anoj de la spiritista movado, teozofia movado (praktika idealismo), reiro al naturo (naturismo, nudismo), vegetaranoj, radikalaj feministaj anarkiistoj, ktp., interesiĝis pri Esperanto. El tia perspektivo, interesaj homoj foreskapus el tradicia analizo, kiel ekzemple Joan Font i Giralt, malfermmensa pastro (prezidanto de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista), mortigita komence de la Hispana Interna Milito; Dume, la plejparto de la kernaj figuroj de la kataluna Esperanto-asocio estis katalunaj naciistoj; sed ankaŭ ekzistis hispanaj naciistoj, inkluzive de la prezidento de Hispanio Lerroux, honora prezidanto de Esperanto-grupo; surprize, SAT anoj en la urbo Sabadell renkontiĝis en la sidejo de la asocio de dungantoj, eĉ kiam ili mortigis unuj la aliajn en la stratoj (en la 1920aj jaroj).

- Sociaj variabloj: rilatoj/egaleco-malegaleco
  - Psikologio: lingva lernado
2. “Esperantika” vidpunkto pri tiaj problemoj: egaleca komunikado kaj aliaj valoroj de la Esperanto-movado
  3. Agado de la Esperanto-movado en la politika, socia, ekonomia kampoj.

**Tonkin.** Ni studu lingvan uzon kaj opiniojn pri lingvoj en Unuiĝintaj Nacioj. Iri al UN kaj peti al ili ke ili uzu Esperanton ne efikas. La gvidantoj ne volas rekoni ke ekzistas lingva problemoj. Ili silentas pri tio. Aliflanke, neniu demandas la opinion de la simplaj funkciuloj.

**Gazzola.** Trovu temon interesan kaj studu la lingvan dimension. Ekzemple, lingvo kiel kaŭzo de malegaleco kaj diskriminacio. Tiaj temoj interesiĝos al la nova redakta teamo de *LPLP*.

**O’Riain.** En UN en neformala etoso oni ĉiam uzas la anglan. En formala etoso, oni insistas uzi la propran lingvon, se oficiala. Kaj pli kaj pli da diplomatoj parolas pri multlingveco.

**Gazzola.** En sociaj sciencoj malmultaj homoj konscias pri lingvaj problemoj kaj ties sekvoj.

**Mánzano-Arrondo.** En la kadro de la studoj pri subpremado, ekzistas universitata subpremado. Studi Esperanton kiel solvon al tiu ĉi problemoj.

**Gazzola.** Videbligi Esperanton en la universitato. Ekz. la simpozioj en Berlino, tiu en itala kongreso pri politika scienco organizita de Alcalde. Ni organizu tiajn kolokvojn ene de grandaj konferencoj.

**Reinwart.** La lingva problemoj aperas en multaj sektoroj de la socio, ekz. malsanulejoj ktp.

**Koutny.** Aldoni kulturajn kaj interkulturajn variablojn, inkl. de la eduka rolo de Esperanto (propedeŭtika valoro), ankaŭ por la maljunuloj, kio fakte estas socia tereno.

**Grosjean.** Kalkuli kiom da Nobel-premiitoj estas anglalingvanoj, diris Piron.

**Baláž.** Tiu kalkulo jam ekzistas.

**Grosjean.** Piron diris ke relative multe da esperantistoj gajnis Nobel-premion. Aŭ ni estas geniuloj aŭ estas pli da esperantistoj ol oni pensas.

**Raola.** Teni la torĉon ĝis kiam la kondiĉoj estos bonaj por enkonduki Esperanton en la sciencaj rondoj.

**Gazzola.** Okupiĝi pri *nunaj kaj aktualaj* lingvaj problemoj.

**Baláž.** Alianciĝi kun aliaj organizoj pri aliaj temoj, ekz. Erasmus+. Verki artikolojn por gazetoj. Kontribui al ŝanĝo de la monda lingva sistemo, for de la angla. Eblo estas DIEM25, kiel diras Ana Alejo en la bonvenigaj vortoj por tiu ĉi simpozio.

**O’Riain.** Okupiĝi pri la lingva reĝimo de EU, inkl. de la lingva demando de la Ombudsmano.<sup>2</sup>

**Keefe.** Atenti pri diskriminacio en la uzo de la angla. Eĉ se oni scipovas bone la anglan, anglalingvaj denaskuloj havas privilegion, ili tuj rekonas ke estas unua- kaj duaranga angla.

**Manzano-Arrondo.** Alianci kun internaciaj universitataj movadoj, kiuj laboras por starigi la uzon de la propraj lingvoj.

## **Vicente Mánzano-Arrondo (Universitato de Seviljo, Hispanio)**

### ***Kognaj biasoj pri la angla***

Mánzano-Arrondo klarigas, ke en siaj kursoj pri metodologio (fako: psikologio) li proponas al la studentoj esplori pri Esperanto. Je la komenco ili scias nenion prie. Je la fino, multaj el ili scias multon, pluraj pli interesiĝas, kelkaj lernas la lingvon kaj du el ili estas nun en IJK.

Unu el liaj esploroj estas farata kune kun Alcalde. Temas pri analizo de la perceptoj en la eŭropa loĝantaro pri la disvastigo de la angla. La ĉefa unua rezulto, bazita sur enketo al 400 homoj de pluraj

<sup>2</sup> Vidu <https://www.liberafolio.org/2018/08/30/uea-instigas-respondi-guste-al-eu-enketo/>



studniveleoj ktp estas ke la homoj sisteme trotaksas tiun disvastigon. Ekzemple, en Hispanio, laŭ Eŭrostat (uzata ankaŭ de Michele Gazzola, de EU Komisiono ktp) 6% de la homoj scipovas bone la anglan. Tamen, la ĝenerala percepto estas 30%. Kompreneble indas pridiskuti la metodologion uzatan, ekz pri la uzo de Eurostat. Tamen, la rezulto estas tiel drasta ke permesas eltiri konkludojn/hipotezojn. La aŭtoroj identigas du kognajn biasojn: (a) Homoj kiuj bone regas la anglan imagas ke "ĉiu alia bone scipovas la anglan"; (b) homoj kiuj havas neniun konon de la angla imagas ke "ili estas la solaj kiuj ne scipovas ĝin." Estontece la studo ampleksiĝos por studi ĉiun landon de EU. Provizoraj rezultoj tiurilate montras ke tiuj kognaj biasoj ekzistas ne nur en Hispanio, kvankam en malsamaj landoj ili malsamas.

Tiuj du kognaj biasoj estas potenciale gravaj malkovroj multdimensie, kaj exploreblas kaj kiel kaŭzo, kaj kiel sekvo. Ekzemple, kiel kaŭzo: kiam homoj argumentas "kial utilas lerni E-on se jam ĉiu scipovas la anglan", eblas respondi per la ekzisto de tiuj biasoj, kiuj verŝajne respondecas (almenaŭ parte) pri tiaj misinformitaj argumentoj. Kiel sekvo, indas esplori kial tiuj kognaj biasoj kreiĝas. Ĉu spontanee, ĉu planite?

**Baláž.** Ekzistas anglalingva libro pri tiaj mitoj en Svedio.

**Gazzola.** Atenti aliajn problemojn rilate al lingvo. Ekz. lingvo-testoj, kiujn migrantoj devas fari.

**Kováts.** Esplori ĝis kioma grado tiuj biasoj okazas en aliaj landoj. Kelkaj sisteme subtaksas siajn lingvajjn konojn pri Esperanto. Esplori ĉu ili subtaksas/trotaksas la konon en siaj propraj lingvoj.

**Kiselman.** En kelkaj landoj de Afriko kaj Azio lokaj kaj naciaj lingvoj akiras pli da spaco, kio signifas ke la angla kaj la franca perdas ĝin.

**Keefe.** Tiaj efikoj estas antaŭplanitaj: ekzistas sekreta lingvo de lingvo-testado. Temas pri kampo de financaj interesoj, pri lingotesta industrio.

**Rao.** Studo de World Bank kun 800 lernejoj konkludis pri mikso de subtaksado/trotaksado.

**Goodall.** Similaj biasaj perceptoj ekzistas pri rifuĝintoj: oni trotaksas ilian kvanton. Kiel oni povas certigi science ke tiuj rezultoj ne simple signifas ke homoj estas malbonaj sociologoj?

**Kováts.** Substreki ke Mánzano-Arrondo laborigis la studentojn pri Esperanto.

**Mánzano-Arrondo.** Ĉiu studobjekto taŭgas por tion fari.

**Tonkin.** Ni konsciuj pri tio ke Eurostat-datumoj ne perfektas. Multaj aliaj mezuriloj meritas esploron.

**Garvía.** Indas legi la artikolon de Ammon pri la timo de la germanoj paroli la anglan.

## **Grant Goodall (Universitato de Sandiego, Kalifornio)**

### ***Kiujn lingvojn oni instruu en la universitato?***

Goodall prezentis la faktorojn, kiujn oni uzas en lia universitato por decidi kiujn lingvojn oni instruu: en la universitato:

- **Graveco.** Lingvoj multe parolataj, lingvoj de la landoj, kun kiuj la nia havas rilatojn.
- **Postulo.** Alivorte, ni bezonas studentojn do ni devas oferti lingvojn postulatajn de ili.
- **Instruistoj.** Ĉu ni povas trovi profesinivelan instruistojn? Temas pri pli granda temo ol tio kion multaj pensas.
- **Materialoj.** Foje se ne estas bonegaj instruistoj, tamewn ekzistas bonegaj materialoj.
- **Universitato.** Bezonoj de la universitato mem. Rilato de la lingvo instruata kun la fakoj instruataj ktp. Foje oni bezonas kurson eĉ se ne estas tiom da studentoj.

Goodall komparis la situacion pri la Usona Gestolingvo kaj tiun pri Esperanto, kiuj similas: malfacilas trovi instruistojn kaj bonajn materialojn, la lernantoj pensas ke Esperanto estas tiom facila ke ili ne devas studi. En lia universitato eblas instrui kurson de Esperanto kiam estis multe da studentoj (ĉefe en somero).

**Leoni.** Ekde 1992 en la Universitato de Kostariko Esperanto estas instruata en la fako de filologio, sed ne en tiu de modernaj lingvoj. Iel ajn, ĝi estas instruata kiel vivanta lingvo.

**Alcalde.** Pensi pli ambicie: Ĉu estas absurde pensi pri uzo de Esperanto en la universitata lingva reĝimo, kiu iras trans la koncepto de Esperanto simple kiel instruata lingvo?

**Koutny.** Uzi Erasmus+ por interŝanĝoj inter kolegoj. Se oni havas bonan postenon, oni povas instrui senpage kaj tio estas permesata. Kelkaj el ni tiel laboras parton de nia tempo.

**Goodall.** Pripensi interŝanĝojn inter universitatoj. Ekz, unue lerni Esperanton kaj poste iri al IJK.

**Majerczak.** Jen pluraj spertoj: (1) Iam estis brigado de esperantistoj; niaj lernantoj kunlaboris kun ili kaj tio altiris la allogon de la lingvo. (2) La universitato donas monon por propagandi la lingvojn instruatajn de la universitato. (3) Sciencaj rondoj estas en nia universitato – ne nur por studentoj, sed ankaŭ sciencistoj. Eblas eniri tiujn rondojn ankaŭ pere de Esperanto. Kaj eblas ricevi financon helpon de la universitato. Gravas ke estu morala subteno al tiuj rondoj.

**Charters.** Ni bezonas bonan universitatnivelan retan kurson.

**Díaz Bautista.** Krei komunumon. Kaj krei laborgrupon, inkluzive de Angela Tellier en ŝia rolo kiel kunordiganto de ESF pri universitataj kontaktoj. Ni devas krei 'diskurson', kiel Mánzano-Arrondo diras en sia parto de la longa raporto.<sup>3</sup>

**Kováts:** Uzi la datumbazan parton de edukado.net.

## Konkludoj

Tonkin prikomentis la konkludojn de la Nitobe-simpozio de Amsterdamo en 2008. La partoprenantoj konstatis, ke plejparte ili ankoraŭ validas. Surbaze de la nunaj diskutoj, Tonkin proponis la jenajn agadojn:

1. Kompletigi la raporton *Universitato kaj Esperanto* ĉe [kunagade.org](http://kunagade.org)
2. Daŭre utiligi la retejon [edukado.net](http://edukado.net)
3. Pretigi adapteblajn lernolibrojn kaj manlibrojn universitatnivelaĵojn pri Ekl baze de ekz. libro de Vera Barandovska-Frank por Poznan kaj ankaŭ la kolekto de Kiselman *Aliroj al Esperanto*.
4. Daŭrigi la bibliografion de Modern Language Association. Natalia Dankova prizorgos.
5. Daŭrigi altnivelaĵojn seminariojn kiel tiun de la Universitato de Kostariko.
6. Prepari sesiojn, kolokvojn ktp. pri Ekl en grandaj fakaj konferencoj.
7. Plie kunlabori kun ILEI kaj varbi universitatajn profesorojn por ke ili aliĝu al ILEI
8. Stimuli esplorojn pri Ekl per financaj kaj aliaj faciligoj, per informado al interesatoj pri eblaj fontoj de rimedoj, kaj per starigo de esploraj kolektoj (kiel ekz. tiu de la Aŭstria Nacia Biblioteko).
9. Utiligi la eblojn de interŝanĝoj, ink. de Erasmus+.
10. Eventuale starigi laborgrupon por produkti libron "Esperantistoj kiel pioniroj" cele al altigo de la prestiĝo de Esperanto ekster niaj rondoj.
11. Pliesplori la daŭrigon de la programo de Poznano en la estonteco.
12. Starigi laborgrupon pri reta instruata platformo (ink. de filmoj de profesoroj k.s.).

<sup>3</sup> Vidu <http://kunagade.org/raporto-esf-2018/>

13. Kunlabori kun la lingvomuzeoj.
14. Starigi laborgrupon aŭ fakan asocion, aŭ utiligi jam ekzistantajn strukturojn (ekz-e CED) por kunordigi universitatnivele interesatojn pri Ekl, soci/interlingvistiko, kaj sociaj sciencoj; kunlabori ankaŭ kun la komisiono de ILEI pri universitatoj.
15. Ree ekzameni la amsterdamajn konkludojn kaj realigi tiujn kiuj ne estis realigitaj sed restas aktualaj.

## BIBLIOGRAFIO DE CITITAJ VERKOJ

- Adams, Michael. 2011. *From Elvish to Klingon: Exploring invented languages*. Oxford: Oxford University Press.
- Auld, William. 1988. *La fenomeno Esperanto*. Rotterdam: UEA.
- Barandovská-Frank, Věra. 2017. *Interlingvistiko: Enkonduko en la sciencon pri planlingvoj*. Proveladono. Poznan: Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj, Lingvistika Instituto, Universitato Adam Mickiewicz.
- Corsetti, Renato, Maria Antonietta Pinto k Maria Tolomeo. 2004. Regularizing the regular: The phenomenon of overregularization in Esperanto-speaking children. *LPLP* 28:261-282.
- Fantini, Alvino k Timothy Reagan. 1992. *Esperanto and Education: Toward a Research Agenda*. Washington, DC: Esperantic Studies Foundation.
- Frank, Helmar. 1993. Propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo. *Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko*, Band 6: 424-442.
- Garvía, Roberto. 2015. *Esperanto and Its Rivals: The Struggle for an International Language*. Philadelphia: University of Pennsylvania Press.
- Gordin, Michael D. 2015. *Scientific Babel: How Science Was Done Before and After Global English*. Chicago: University of Chicago Press.
- Grin, F. 2005. *L'enseignement des langues étrangères comme politique publique*. Rapport ... du Haut conseil de l'évaluation de l'école, 19. Paris: Haut conseil de l'évaluation de l'école.
- Heller, Monica. 2017. Dr. Esperanto, or Anthropology as alternative worlds. *American Anthropologist* 119/1: 12-22.
- Janton, Pierre. 1988. *Esperanto: lingvo - literaturo - movado*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Janton, Pierre. 1993. *Esperanto: Language, Literature, and Community*. Red. Humphrey Tonkin. Tr. Humphrey Tonkin, Jane Edwards, Karen Johnson-Weiner. Albany, NY: State University of New York Press.
- Kiselman, Christer, red. 2018. *Aliroj al Esperanto*. Dobřichovice, CZ: KAVA-PECH.
- Korĵenkov, Aleksander. 2011. *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof*. 2nd edition. Kaliningrado: Sezonoj / Kaunas: Litova Esperanto-Asocio.
- Korzhenkov, Aleksander. 2010. *Zamenhof: The Life, Works and Ideas of the Author of Esperanto*, trans. Ian Richmond. New York: Mondial.
- Künzli, Andreas. 2010. *L. L. Zamenhof (1859-1917): Esperanto, Hillelismus (Homaranismus) und die "jüdische Frage" in Ost- und Westeuropa*. Wiesbaden: Harrassowitz.
- Lins, Ulrich. 2016. *La danĝera lingvo: Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*. Reviziita eldono. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Lins, Ulrich. 2016. *Dangerous Language: Esperanto under Hitler and Stalin*. London: Palgrave Macmillan.
- Lins, Ulrich. 2017. *Dangerous Language: Esperanto and the Decline of Stalinism*. London: Palgrave Macmillan.
- Lloancy, Robert. 2015. Kongresa enigmo aŭ enigma kongreso. Michela Lipari k Humphrey Tonkin, red. *Tamen ĝi moviĝas: Eseoj pri la Esperanto-movado*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. 71-90.
- Minnaja, Carlo, and Giorgio Silfer. 2015. *Historio de la esperanta literaturo*. La Chaux-de-Fonds, Svislando: Literatura Foiro.
- Okrent, Arika. 2009. *In the Land of Invented Languages*. New York: Spiegel & Grau.
- Piron, Claude. 1988. *Psikologiaj reagoj al Esperanto*. Esperanto-dokumentoj 26E. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Piron, Claude. 1994. *Le Défi des langues. Du gâchis au bon sens*. Paris: L'Harmattan.
- Pool, Jonathan. 1996. Optimal language regimes for the European Union. *International Journal of the Sociology*

- of Language* 121:159-180.
- Rohr-Brackin, Karen, k Angela Tellier. 2018. Esperanto as a tool in classroom foreign language learning in England. *LPLP* 42/1: 89-111.
- Schor, Esther. 2015. *Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language*. New York: Metropolitan Books/Henry Holt.
- Selten, R. k J. Pool. 1991. The distribution of foreign language skills as a game equilibrium. En Selten, R. (red.), *Game equilibrium models*. Vol. 4. Berlin: Springer, 64-87.
- Sikosek, Marcus. 2006. *Die neutrale Sprache: Eine politische Geschichte des Esperanto-Weltbundes*. Bydgoszcz: Skonpres.
- Sutton, Geoffrey. 2008. *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*. New York: Mondial.